

PETENDA KAJ DISPARTIGENDA PANO

(Mt.6,5-15)

Artikolo de Alberto Maggi publikigita en NIGRIZIA n.2 2011

Tiuj ĉi estas konsiderataj la versegoj plej malfacilaj ne nur el la Evangelio sed el la tuta Nova Testamento. Ilia traduko estas malfacilega afero aŭ eĉ neblaĵo, ĉar tiu ĉi teksto entenas vortojn ne ekzistantajn en la greka lingvo. La lasta traduko de la Biblio fare de la Itala Episkopara Konferenco (CEI) en la jaro 2008 alportis kelkajn plibonigojn, sed multo restas ankoraŭ por fari.

Kiel eblas ke tiuj ĉi versegoj, kiujn ni konas kiel la *“Patro nia”*, estu tiel komplikaj? Jam Sankta Tereza el Avila, granda mistikulino kaj Eklezia doktoro, esprimis sian embarason demandante de si mem *“kial Dio ne klarigis pli bone kelkajn aspektojn tiom altajn kaj malklarajn por pli bone sin komprenigi. Kaj ŝajnis al mi ke ĉar tiu ĉi preĝo devas esti komuna kaj utili al ĉiuj, estis bezonate ke ĉiu povu ĝin apliki al siaj apartaj bezonoj kaj povu trovi en ĝi motivon por konsolo estante certa ke li ĝin bone komprenis”*.

La nesuperebla problemo pri la *“Patro nia”* naskiĝis ĝuste ĉar oni konsideris ĝin nur kiel preĝon. Farante tion oni izolis la grandecon de tiu ĉi teksto en la kadro de la preĝaj devotaĵoj, kun sekvoj tiel kontraŭantaj kiel ruinigaj por la fido. Sufiĉas pripensi la preĝpeton *“nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ”* (Mt. 6,11), kiu alprenas malsamajn signifojn laŭ la latitudoj kie ĝi estas elparolata. Dum en la prospera okcidenta medio, kie pano abundegas kaj oni ĝin ĵetas en la rubujon (nur en la urbo Milano ĉiutage oni forĵetas en rubujon jes, ja cent okdek kvintalojn da pano), ĝi fariĝas sekureco je propra bonfarto, en la lasta mondo, tiu kie ĉiutage mortas pro malsato dudek ses mil infanoj, por la skelete maldika kredantoj tiu ĉi preĝo estas signo je neokazinta promeso. Ili preĝas kiel la dikventraj privilegiitaj kristanoj de la riĉabunda mondo, sed la efikoj ne videblas, la ĉiutaga pano restas miraĝo, kaj la *“donu al ni hodiaŭ”* ĉiutage sonas kiel moko.

Tamen la *Patro nia* celis esti ĝuste la rimedo kaj la solvo de tiu ĉi maljustaĵo. Fakte Jesuo ne intencas instrui preĝon, sed li invitas siajn disĉiplojn al praktikado de la beatproklamoj por la efektivigo de la Regno de Dio, kaj la *Patro nia* estas, kiel preĝo, la formulo pri la akcepto de la beatproklamoj de Jesuo (Mt. 5, 3-10).

Plenŝtopita ĉielo

Kiel Moseo post kiam li fiksas la interligon inter la popolo kaj la Sinjoro pere de la dekalogo (Readm. 5,6-21) li esprimis la akcepton de la dek ordonoj pere de la *“Aŭskultu do, Izrael”* (Read. 6,4-10), sammaniere Jesuo esprimas en la *Patro Nia* la akcepton de la beatproklamoj.

La unua beatproklamo rilatas la elekton de la malriĉeco, nome la elekton de la sindonema kundivido kiu permesas al Dio manifestiĝi kiel reĝo, tiu kiu prizorgas la malriĉulojn (Mt. 5,3). Tiu ĉi engaĝiĝo permesas al liaj filoj lin voki kiel *Patron*, la

ununura kiu *estas en la ĉielo* (Mt. 6,9), la ununura kiu havante la dian kondiĉon povas regi la homojn.

En la tempo de Jesuo la ĉielo estis ege plenŝtopita, *en la ĉielo* ne estis nur la Sinjoro, sed eĉ kiu ajn havis povon, tiu vivis "en la ĉielo", ĉar li estis super ĉiuj kaj opiniis sin kvazaŭ sama al diaĵoj (Jes. 14, 12-13; 2Mak. 9,8). Fakte estis konsiderataj kiel dioj aŭ kiel filoj de la dioj, la imperiestroj kaj faraonoj, la reĝoj kaj la princoj, la steloj kaj ĉio kio rilatis la povon, *ĉu tronoj, ĉu regecoj, ĉu estrecoj, ĉu aŭtoritatoj* (Kol. 1,16). En epoko kiam, se oni ne agnoskis la diecon de la imperiestro, oni perdis eĉ sian kapon (Apok. 13,15; Read. 3,1-6.15) Jesuo proklamas kiel tiun kiu estas en la ĉielo nur la Patron, kaj li invitos ne agnoski al iu ajn alia la rolon de patro (*Nomu neniu sur la tero via "patro"; ĉar Unu, kiu estas en la ĉielo, estas via Patro*", Mt. 23,9).

Post la akcepto de la unua beatproklamo, tiu kiu permesas al la regno fariĝi realaĵo (*ilia estas la regno de la ĉielo*", Mt.5,3) Jesuo anoncas la efikojn de tiu ĉi regno, per la fino de la subpremado por la plorantaj homoj, la rehavigo de la digneco al la senhereduloj, kaj per la senigo de ĉiu formo de maljusteco (Mt. 5, 4-6) Tio estas ankaŭ la enhavo de la unuaj tri petoj entenataj en la *Patro Nia* kiuj rilatas la efikojn sur la homaron de la aktiveco de tiuj, kiuj akceptis la beatproklamojn. Pro tio oni petas ke la nomo de la Sinjoro estu sanktigata (Mt. 6,9), nome ke Li estu rekonata kiel Patro, kiel tiu kiu ne nur prizorgas siajn filojn, sed antaŭvidas iliajn bezonojn.

Poste Jesuo invitas peti ke la regno de la Patro plivastiĝu (Mt. 6,10). Tiu ĉi regno ne devas veni, ĝi jam estas. Ekde kiam la disĉiploj akceptis la unuan beatproklamon la regno ne plu estas promeso sed realaĵo. Tamen nun la komunumo petas ke tiu ĉi sia sperto pri la regno plilarĝiĝu por alporti ties vivigajn bonaĵojn al ĉiu homo. Pro tio la komunumo petas ankaŭ ke la volo de la Patro fariĝu, realigante tiamaniere lian planon de amo al la homaro: ke ĉiu homo povu fariĝi lia filo (Ef. 1,5).

La dua parto de la beatproklamoj (Mt. 5, 7-9) rilatas la efikojn de la akcepto de la beatproklamoj sur la disĉiplojn, kun ilia iompostioma transformiĝo al uloj ĉiam pretaj helpi (*kompatemaj*), sinceraj (*kore puraj*), kaj respondecaj pri la feliĉo de la aliuloj (*pacigantoj*).

Same la sekvantaj tri petoj de la *Patro Nia* rilatas la komunumon. Centre estas la plej grava, tiu kiu rilatas la peton pri la *pano*, ĝi esprimiĝas per vorto kiu ne ekzistas en la greka lingvo "*Donu al ni hodiaŭ nian panon επίουσίον...*" (Mt. 6,11) Sankta Hieronimo, la tradukinto de la Biblio, sin trovis embarasita fronte al tiu ĉi nekonata vorto kiu ĉiukaze indikas apartan panon, kaj li decidis traduki la saman terminon laŭ du malsamaj manieroj: per "*supersubstantialem*" en la Evangelio laŭ Sankta Mateo, kaj per *cotidianum* en la Evangelio laŭ Sankta Luko. La Eklezio poste preferis la "*Patron Nian*" laŭ la Evangelio de Sankta Mateo por la liturgia versio, ĉar ĝi estis konsiderata pli kompleta ol tiu laŭ Sankta Luko, sed kun la anstataŭigo de la komplika (kaj ne alparolebla en la itala *supersostanziale*) *substance supera* per la malpli komplika vorto *ĉiutaga*.

Tiu ĉi elekto ne nur misojigis la signifon de la peto de Jesuo, sed ĝi eĉ kontraŭis lian instruon mem ("*ne zorgu, dirante: Kion ni manĝu?*" , Mt.6,31). La pano kiu nutras kaj subtenas la vivon de la homoj ne devas esti petata al Dio, sed

estas ja tasko de la homoj ĝin produkti kaj malŝpare kundividi kun tiuj kiuj ĝin ne havas, kiel ekde ĉiam estis instruate (*"Donu iom da via pano al malsatuloj..."*, Tb 4,16 ; Jes. 58,7).

La fakto ke tiu ĉi aparta pano estu petata al la Patro signifas ke temas pri nutraĵo kiu povas esti nur donaco de la Sinjoro kaj ne homa produktaĵo: tiu ĉi pano estas Jesuo mem kiel fonto de vivo kaj nutraĵo por la komunumo (Mt. 4,4; 26, 26). Jesuo, la Filo de Dio sin faras pano por la homoj, tiel ke kiuj lin akceptas kaj kapablas siavice fariĝi pano por la aliuloj, tiuj ĉi fariĝu filoj de la sama Patro.

Estas tiu ĉi pano-Jesuo kiu komunikas la forton malavare kundividi la onian propran ekziston kaj la havaĵojn, eĉ ĝis la forviŝado de la alies ŝuldoj. Komunumo kiu elektis la beatproklamon pri la malriĉeco, kaj kiu spertis ke *"Pli feliĉe estas doni, ol ricevi"* (Agoj 20,35) fakte ne povas konsisti el kreditoroj kaj ŝuldantoj (Mt.6,12), sed ĝi scios fari el malavara donacemo sian distingilon mem.

La beatproklamoj finiĝis per la certigo pri la dia protektado eĉ en la momento de la persekuto (Mt.5,10). Sammaniere la fideleco al Jesuo donos al la komunumo la forton resti firma eĉ en la momento de la plej granda pruvo (Mt.6,13) tiu de la humiliga morto de ĝia Majstro kaj de la persekuto kiu eksplodos kontraŭ liaj disĉiploj.

La *Patro Nia* finiĝas per la peto de la komunumo ke ĝi estu gardata kontraŭ la ĉeesto de la *malbonulo*, bildo en kiu la evangeliisto trovas situaciojn kaj homojn kiuj resendis al la komunumo la tentojn al kiuj la diablo, la malbonulo en eminenta senco (Mt.13,19), submetis la Kriston en la dezerto. Dum Jesuo restas centre de la komunuma vivo kiel ununura majstro, sola estro kaj ununura gvidanto, kaj liaj vorto kaj korpo, kiel pano, nutras kaj kreskigas liajn anojn, estas ekskludita el la komunumo mem la ĉeesto de la diablo.

Alberto Maggi